


Tokipono

La lingvo de bono



Sonja Lang

Tradukis el la angla
Spencer van der Meulen

La originalan anglan eldonon kontrolis Christopher Huff (*jan Kowisi*), Matthew Chisholm (*jan Matejo*), Joop Kieft (*jan Mimoku*), Michael Everson, Aaron Chapman (*jan Alono*), John Clifford (*jan Kipo*), Matthew Martin (*jan Mato*), Bryant J. Knight (*jan Pije*), Robert Warnke (*jan Lope*), Sam Brenner (*jan San*), Kobi Kai Calev (*jan Ka*), Nizar Habash (*jan Nisa*) kaj Paul Swift (*jan Po*).

La esperantan tradukon faris Spencer van der Meulen (*jan Pensa*), kaj ĝin provlegis Sonja Lang (*jan Sonja*), Stephan Schneider (*jan Tepan*), kaj Robin van der Vliet (*jan Lopin*). La antaŭparolon sur paĝo 9 tradukis Sonja Lang.

La bildstriojn sur paĝo 77 faris Russ Williams. La ilustraĵojn sur paĝo 105 faris Yara Hindawi. La kaligrafiaĵojn en *sitelen sitelen* sur paĝoj 78 ĝis 84 faris Jonathan Gabel.

La kantotekston *ale li pona* sur paĝo 95 verkis Joop Kieft (*jan Mimoku*). La rakonton *jan lawa Oliko* verkis Eŭgeno (*soweli Elepanto*) surbaze de *Песнь о вещем Олеге* verkita de Aleksandr Puŝkin. La poemon *Ho, mia kor'* sur paĝo 98 verkis L. L. Zamenhof, kaj ĝian tradukon *a, pilin mi o* verkis Spencer van der Meulen (*jan Pensa*). La poemon *kiwen walo* sur paĝo 99 verkis *jan Kapilu*, kaj la tradukon sur paĝo 100 faris Spencer van der Meulen (*jan Pensa*), Kiah Morante (*jan Kaja*) kaj Sonja Lang (*jan Sonja*).

Originala angla eldono ©2014 Sonja Lang

Rimarkoj pri originala eldono ©2021 Sonja Lang

Esperanta eldono ©2022 Spencer van der Meulen

Bazita je la germana eldono de Julius Strake (*jan Juli*) el 2021.

Paĝoj 1 ĝis 24, 103 ĝis 115 kaj 124 ĝis 136 estas uzeblaj laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Nekomerce 4.0 Tutmonda (CC BY-NC 4.0):

<https://creativecommons.org/licenses/by-nc/4.0/deed.eo>

La enhavo sur paĝoj 96 kaj 97 (*jan lawa Oliko* ©2009-2022 Eŭgeno (*soweli Elepanto*); esperanta traduko kaj enkonduko ©2022 Spencer van der Meulen) estas uzebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite 4.0 Tutmonda (CC BY 4.0):

<https://creativecommons.org/licenses/by/4.0/deed.eo>

La sekcioj *ale li pona* kaj *a, pilin mi o* (paĝoj 95 kaj 98), la ĉapitro Hieroglifoj (paĝoj 116 ĝis 123) kaj la oficiala tokipona vortaro (paĝoj 137 ĝis 147) estas uzeblaj kiel publika havaĵo, pere de CC0 1.0 Universala:

<https://creativecommons.org/publicdomain/zero/1.0/deed.eo>

ISBN: 978-94-6437-609-8

memore al
Rick Miller
(jan Wiko)

Esperanto

Tiu ĉi dosiero estas kolekto de ĉiuj paĝoj el la libro *Tokipono: La lingvo de bono* de Sonja Lang (ISBN: 978-94-6437-609-8), kies permesiloj kongruas kun permesiloj de la tipo CC BY-SA. Mi publike disponebligas ilin, por ke oni povu pli facile uzi la permesilojn por krei novajn verkojn. Fine de la dosiero estas detala listo de atribuoj kaj permesiloj.

Rimarku ke paĝoj 1-8 kaj 148-149 de la libro (koresponde al paĝoj 1-8 kaj 32-33 en ĉi tiu PDF) estas nun uzeblaj per CC0 1.0, kun permeso de ĉiuj rajtohavantoj. En ĉi tiu dokumento estas ankaŭ listo de ĉiuj piednotoj en la libro, kiu estas uzebla per la permesilo CC BY 4.0.

English

This file is a collection of all pages from *Tokipono: La lingvo de bono* by Sonja Lang (ISBN: 978-94-6437-609-8) that are compatible with CC BY-SA licenses. I make them freely available to make it easier for people to use the licenses to make new works. At the end of the document is a detailed list of credits and licenses.

Note that pages 1-8 and 148-149 of the book (corresponding to pages 1-8 and 32-33 in this PDF) are now available under CC0 1.0, with permission from all rights holders. In this document there is also a list of all footnotes from the book, which are made available under the license CC BY 4.0.

Enhavo

Antaŭparolo al la esperanta eldono	7
Antaŭparolo	9
Kio estas Tokipono?	11
Parto 1: Lecionoj	15
1. Literoj kaj sonoj	17
2. Vortoj kaj frazoj	19
3. Substantivoj kaj adjektivoj	22
4. Vi kaj mi	25
5. Verboj	28
6. Pli da adjektivoj	32
7. Demandoj kaj respondoj	36
8. Prepozicioj	39
9. Propraj nomoj	42
10. Salutoj kaj sentoj	45
11. <i>pi</i>	49
12. Nombroj	52
13. Antaŭverboj	54
14. Koloroj kaj <i>la</i>	57
15. Lokvortoj	60
16. Partikuloj kaj perspektivoj	62
17. Ĉasa aventuro	64
18. Kuiranta aventuro	66
19. Ek al la esplorado	68
Solvoj	69

Parto 2: Tekstoj	75
Bildstrioj de Russ Williams	77
Tokiponaj proverboj	78
Famaj citaĵoj	86
La Torao	88
La Evangelio	89
La Korano	91
Skribaĵoj de Bahá'u'lláh	93
Kanto: <i>ale li pona</i>	95
Rakonto: <i>jan lawa Olik</i>	96
Poemo: <i>a, pilin mi o</i> (Ho, mia kor')	98
Poemo: <i>kiwen walo</i>	99
Parto 3: Vortaroj	103
Mansigna Tokipono	104
Hieroglifoj	116
Loknomoj	124
Lingvonomoj	132
Utilaj frazoj	136
Oficiala tokipona vortaro	137
Aldonaĵo: <i>nimi ku suli pi pu ala</i>	148

Antaŭparolo al la esperanta eldono

Meze de la jaro 2022, mi ĝojas finfine povi prezenti esperantan version de la unua oficiala libro de Tokipono, ok jarojn post la originala anglalingva eldono. Ĝi estas rezulto de delonga amikeco kaj reciproka intereso inter la anoj de Esperantujo kaj Tokiponujo.

Kvankam Tokipono ne estas esperantido, mi dirus, ke je pluraj flankoj ĝi estas preskaŭ kiel ido de Esperantujo. La lingvo estas kreita de esperantisto, kaj ŝi lasis klarajn spurojn de la lingvo internacia en sia eta kreaĵo. Krome, dum la plejmulto de ĉirkaŭ 20 jaroj da ĝisnuna historio de la lingvo, granda parto de novaj lernantoj de Tokipono estis esperantistoj, kiuj aŭdis pri la lingvo de aliaj esperantistoj. Ili multe kontribuis al la frua kresko de la lingvo. Amiko de mi iam duonŝerce rimarkis, ke Tokipono estis kvazaŭ minoritata lingvo de Esperantujo.

Post longa flegado de entuziasmaj esperantistoj, nuntempe la tokipona komunumo multe kreskas kaj maturiĝas, postlasis sian dependecon de la plej granda planlingvo, kaj iĝis kredeble la due plej uzata planlingvo en la interreto. En unu jaro la tokiponistaro kreas pli da rakontoj, poemoj, tradukoj, artaĵoj kaj muziko¹ ol ĉio, kio ekzistis en Tokipono, kiam la unua oficiala libro publikiĝis.

Kun tiu kresko de la komunumo venas ankaŭ plimaturiĝo de la lingvo mem. Ekzistas sufiĉe granda kerno da spertaj parolantoj, tiel ke nun eblas per diskutado kaj reciproka influo atingi nivelon de kompreno kaj sperto pri la lingvo, kiun neniu atingis antaŭe. Mi ofte vidas aplikojn de la lingvo, kiujn antaŭ nur kelkaj jaroj mi opiniis tute neeblaj en la limigoj de Tokipono.

¹Ligiloj al kelkaj rekomendindaj ekzemploj de tiaj tokiponaĵoj estas troveblaj sur la oficiala retpaĝo de Tokipono: <https://tokipona.org>

Por dokumenti tiajn evoluojn Sonja Lang decidis eldoni duan oficialan libron de Tokipono en 2021, kies titolo estas *Toki Pona Dictionary* (tokipona nomo: *lipu ku*). En la komenca parto de la libro ŝi skribis:

“Pasis sep jaroj ekde la eldono de la unua oficiala libro. Tokipono estas vivanta lingvo, do ankaŭ *Tokipono: La lingvo de bono* estu vivanta dokumento. Mi donu kelkajn klarigojn, korektojn kaj kritikojn.”

En ĉi tiu eldono vi trovos ĉiujn tiujn rimarkojn de Sonja en piednotoj, markitaj per la vorto *ku* (kiu signifas “interagi kun la libro *Toki Pona Dictionary*”).

Mi aldonis pli da “*ku*-a enhavo” al la libro, por ke esperantistoj ne maltrafu la plej bonajn partojn de la dua oficiala libro de Tokipono, kiu estas havebla nur en la angla. Sur paĝo 148 estas listo de la plej oftaj kaj konindaj vortoj el la vortara parto de *lipu ku*, kiuj ne estas instruitaj en ĉi tiu libro, kaj sur paĝo 99 estas unu el la du belaj originale tokiponaj poemoj, kiuj estas presitaj en la dua libro.

Mi ankaŭ verkis tokiponigon de fama zamenhofa poemo, kolektis du pliajn tekstojn verkitajn de esperantistaj tokiponistoj, kaj en kelkaj lokoj mi aldonis pli da klarigaj piednotoj, kiuj espereble estos utilaj aŭ interesaj al vi.

Mi esperas, ke ĉi tiu libro povu helpi vivteni longedaŭran amikecon inter la du planlingvaj komunumoj, al kiuj mi apartenas, kaj kiuj estas karaj al mi. Sed eĉ pli mi esperas, ke la ĉarma, eta lingvo de ĉi tiu libro povu doni ankaŭ al vi iom da amuziĝo kaj “poneco”.

o pona!

jan Pensa

Kanto: *ale li pona*

Jen originala kantoteksto laŭ la melodio de *La Espero*, verkita de Joop Kieffe (*jan Mimoku*) el Nederlando:

tenpo pini la, mi kama sona.
tenpo ni la, mi ken sona pona.
jan li toki la, mi toki lili.
ni li tan ni: toki mi li pona.

Antaŭe mi lernis.
Nun mi kapablas bone kompreni.
Se homoj parolas, mi respondas malmulte.
Tio estas ĉar mia komunikado estas bona/simpla.

jan li toki mute la, mi tawa.
toki mi o kama ante mute.
toki mi li nasin toki pona.
nasin mi li ni: ale li pona!

Se homoj multe parolas, mi iras.
Mia komunikado ŝanĝiĝu multe.
Mia parolado estas bona komunikmaniero.
Jen mia maniero: ĉio bonas!

Rakonto: *jan lawa Oliko*

Ĉirkaŭ la jaro 900, Olego la Saĝa posedis grandan regnon en orienta parto de la slavaj landoj. Ekzistas legendo pri lia morto, pri kiu la rusa poeto Aleksandr Puŝkin baladis en la 19-a jarcento. Rusa esperantisto kaj tokiponisto Eŭgeno (soweli *Elepanto*) verkis tokiponan rerakonton de la legendo.

jan lawa ma Oliko li kama tawa utala li tawa kepeken soweli tawa. tenpo wan la ona li kama lukin e jan pi sona mute li toki e ni: “jan sona o toki e ni tawa mi: tenpo kama la mi pilin pona ala pona? mi kama moli tan seme?”

jan sona li toki e ni: “jan lawa o! sina kama suli li kama wawa. sina anpa e jan ike sina ale. sina lawa e ma e telo. jan ala li ken anpa e sina. taso sina kama moli tan soweli tawa sina ni.”

soweli ni li pona tawa jan lawa Oliko. jan Oliko li pilin ike tan sona sin ni. taso ona li toki e ni tawa jan utala ona: “jan mi o pana e soweli tawa ante tawa mi. o weka e soweli ni tan poka mi. mi wile ala tawa kepeken ona. mi wile ala lukin e ona. taso mi wile e ni: ona li pilin pona.”

utala li pini. tenpo sike mute li pini la jan Oliko en jan utala mute ona li moku li toki. jan Oliko li toki e ni: “soweli tawa mi li pilin pona ala pona?” taso ona li kama sona e ni: tenpo pini suli la soweli ni li kama moli...

ni li nasa mute tawa jan lawa. ona li toki e ni: “soweli mi li moli. taso mi awen lon. pakala! jan sona ni li ike li nasa! mi wile lukin e soweli moli!”

jan Oliko li tawa li lukin e soweli moli. ona li kama lon soweli ona la... a! akesi linja li lon soweli moli! ona li moku lili e jan lawa li pana e telo moli. jan lawa Oliko li kama moli tan ni a.

La landestro Olego venis al milito kaj vojaĝis per ĉevalo. Unu fojon li renkontis tre multescian homon kaj diris: “Saĝulo, diru al mi ĉi tion: Ĉu estontece mi fartos bone? Kiel mi mortos?”

La saĝulo diris: “Ho reganto! Vi iĝos grandioza kaj potenca. Vi venkos ĉiujn viajn malamikojn. Vi regos la teron kaj la maron. Neniu povos venki vin. Sed vi mortos pro ĉi tiu ĉevalo de vi.”

Reganto Olego ŝatis tiun ĉevalon, kaj li estis malfeliĉa pro tiu novaĵo. Sed li diris jene al siaj soldatoj: “Miaj homoj, donu al mi alian rajdobeston. Forigu la ĉevalon de mia apudo. Mi ne volas vojaĝi per ĝi, kaj mi ne volas vidi ĝin. Sed mi volas, ke ĝi fartu bone.”

La milito finiĝis. Kiam multaj jaroj pasis, Olego kaj liaj multaj soldatoj kune manĝis kaj parolis. Olego demandis “ĉu mia ĉevalo fartas bone?” Sed li lernis, ke tiu ĉevalo mortis antaŭ multe da tempo...

Tio estis tre stranga afero al la reganto. Li diris “Mia ĉevalo mortis, sed mi ankoraŭ vivas. Diable! Tiu saĝulo estas aĉa kaj stulta! Mi volas vidi la mortintan beston!”

Olego vojaĝis, kaj ekvidis la malvivan beston. Kiam li alvenis ĉe sia ĉevalo... ha! Estis serpento ĉe la malviva ĉevalo! Ĝi mordis la reganton kaj ellasis venenon. Reganto Olego mortis ja pro tio.

Poemo: *a, pilin mi o* (Ho, mia kor')

Mallonge antaŭ ol publikigi Esperanton en 1887, L. L. Zamenhof verkis ĉi tiun poemon:

*Ho, mia kor', ne batu maltrankvile,
El mia brusto nun ne saltu for!
Jam teni min ne povas mi facile,
Ho, mia kor'!*

*Ho, mia kor'! Post longa laborado
Ĉu mi ne venkos en decida hor'?
Sufiĉe! trankviliĝu de l' batado,
Ho, mia kor'!*

Jen tokipona versio de la sama poemo, kun laŭvorta traduko reen al Esperanto. La signifo estas iom ŝanĝita, por ke ĝi povu funkcii kiel memstara tokipona poemo.













<i>a, pilin mi o tawa wawa ala, o awen insa a lon sijelo! tan ni la lawa mi li lawa ala, a, pilin o!</i>	Ho, mia koro, ne moviĝu vigle, restu ja ene, en la korpo! Pro tio mia kapo ne regas, ho, koro!
--	---

<i>a, pilin mi o! pali suli ni li ken ala ken e ni: mi kama jo e wile suli mi? o tawa lili, a, pilin o!</i>	Ho, mia koro! Ĉu tiu ĉi longa laborado ebligos, ke mi ekhavos mian deziregon? Moviĝu malmulte, ho, koro!
---	---

Hieroglifoj

La literoj de la latina alfabeto (prezentitaj en Leciono 1) estas la plej ofta kaj oportuna maniero por skribi Tokiponon. Ekzistas ankaŭ la ornama skribsistemo *sitelen sitelen*, farita de Jonathan Gabel. (Ekzemploj troveblas sur paĝo 78.)

En ĉi tiu sekcio mi prezentos simplan hieroglifan sistemon, kiu nomiĝas *sitelen pona*. Oni skribas ĉiun tokiponan vorton per unika logogramo aŭ simbolo.

			
<i>a</i>	<i>akesi</i> ²⁵	<i>ala</i>	<i>alasa</i>
			
<i>ale</i>	<i>anpa</i>	<i>ante</i>	<i>anu</i>
			
<i>awen</i>	<i>e</i>	<i>en</i>	<i>esun</i>

²⁵Noto de la aŭtorino: Kvarpiede estas pli ĉarme:





ijo



ike




ilo



insa



*jaki*²⁶



jan



jelo



jo



kala



kalama



kama



kasi



ken



kepeken



kili



kiwen




ko



kon




kule



kulupu

²⁶Noto de la tradukinto: Pli-malpli iu ajn sufiĉe ĥaosa skribaĉo povas esti uzata por skribi *jaki*. Jen kelkaj skribitaj de mi:





kute



la



lape



laso



lawa



len



lete



li



lili



linja



lipu



loje



lon



luka



lukin



lupa



ma



mama



mani



meli



mi



mije



moku



moli



monsi



mu



mun



musi



mute



nanpa



nasa



nasin



nena



ni



nimi



noka



o



olin



ona



open



pakala



pali



palisa



pan



pana



pi



pilin



pimeja




pini



pipi



poka



poki



pona



pu



sama



seli



selo



seme



sewi²⁷



sijelo

²⁷ku: Ekzistas ankaŭ alternativa sekulara formo de la signo de sewi:



Ĝi kongruas kun la aliaj lokvortoj, kiel *anpa*.



sike



sin



sina



sinpin



sitelen



sona



soweli



suli



suno



supa



suwi



tan



taso



tawa



telo



tempo



toki



tomo



tu



unpa



uta



utala



walo



wan



waso



wawa



weka



wile

Kunigitaj signoj

Se estas nur unu adjektivo, oni povas skribi ĝin en aŭ super la vorto, kiun ĝi modifas.



pilin ike



telo lete



kala lili




toki pona

Propraj nomoj

Oni skribas proprajn nomojn en kartuŝo. En ĉi tiu ovala formo, ĉiu signo reprezentas nur la unuan literon de sia vorto.

Kiam vi skribas proprajn nomojn, vi rajtas laŭplaĉe elekti ajnan signon, kiu ŝajnas taŭga al vi. Ekzemple, se vi havas la literon *w* en via nomo, vi povus uzi *waso* se vi ŝatas birdojn, aŭ *wawa* se via forteco estas grava al vi.

Ĉi tiu frazo montras unu manieron por skribi “Kanado”:



ma Kanata li suli

Kanado estas granda.

ku: La komunumo kreis *sitelen-pona*-signojn por multaj ne-puaj vortoj. Ekzemploj de du elstaraj tiparaj projektoj estas *linja sike* de *lipamanka* kaj *linja suwi* de *jan Ana*.

(Kelkaj el la plej oftaj ne-puaj signoj estas sur paĝo 149)

Oficiala tokipona vortaro

a aũ kin ³¹

PARTIKULO (emfazo, emocio aũ konfirmo)

akesi

SUBSTANTIVO reptilio, amfibio ³²

ala

ADJEKTIVO ne, nul

alasa

VERBO ĉasi, kolekti

ale aũ ali

ADJEKTIVO ĉiuj; abunda, nenombrebla, ĉiu

SUBSTANTIVO abundo, ĉio, vivo, universo

NOMBRO 100

anpa

ADJEKTIVO klinanta sin, malsupren, humila, modesta, dependa

ante

ADJEKTIVO malsama, ŝanĝita, alia

anu

PARTIKULO aũ

³¹*ku*: Por malpliigi la vortostokon por lernantoj, la originala angla versio de ĉi tiu libro prezentis kelkajn vortojn kiel unuiĝintajn sinonimojn: *a kaj kin, sin kaj namako, lukin kaj oko*. En efektiva uzado en la tokipona komunumo, kaj antaŭ kaj post la unua eldono de la libro, oni uzas ĉi tiujn vortojn kun malsamaj signifoj. Vidu iliajn difinojn en la aldonaĵo (*nimi ku suli pi pu ala*) sur paĝo 148.

³²Noto de la tradukinto: La originala angla eldono havas ĉe *akesi* la signifon “neĉarma besto”, sed laŭ la notoj de Sonja Lang en *Toki Pona Dictionary* tiu signifo estas eksdata.

awen

ADJEKTIVO daŭranta, tenata, gardata, protektita, sekura, atendanta, restanta

ANTAŬVERBO daŭre ...i, konstante ...i, plu-

e

PARTIKULO (antaŭ la rekta objekto)

en

PARTIKULO (inter pluraj subjektoj)

esun

SUBSTANTIVO bazaro, vendejo, foiro, komerca transakcio

ĵo

SUBSTANTIVO aĵo, fenomeno, objekto, afero

ike

ADJEKTIVO malbona, negativa; neesenca, malgrava

ilo

SUBSTANTIVO ilo, maŝino, aparato

insa

SUBSTANTIVO centro, enhavo, eno, inter; ena organo, ventro, stomako

jaki

ADJEKTIVO naŭza, obscena, malagraba, toksa, malpura, malhigiena

jan

SUBSTANTIVO homo, persono, iu

jelo

ADJEKTIVO flava, flaveca

jo

VERBO havi, porti, enhavi, teni

kala

SUBSTANTIVO fiŝo, mara besto, mara vivaĵo

kalama

VERBO fari sonon; reciti, diri laŭte aŭ voĉe

kama

ADJEKTIVO alvenanta, venonta, estonteca, venigita

ANTAŬVERBO iĝi, sukcesi, elturniĝi pri

kasi

SUBSTANTIVO planto, vegetaĵo; herbo, folio

ken

ANTAŬVERBO povi, rajti

ADJEKTIVO ebla

kepeken

PREPOZICIO uzi, per, uzante

kili

SUBSTANTIVO frukto, legomo, manĝebla fungo

kiwen

SUBSTANTIVO malmolaĵo, metalo, roko, ŝtono

ko

SUBSTANTIVO argilo, kunteniĝanta aŭ glueca formo, pasto, du-
onsoldaĵo, pulvoro

kon

SUBSTANTIVO aero, spiro; esenco, spirito; kaŝita realaĵo, io ne-
vidata kio havas ian efikon

kule

ADJEKTIVO kolora, pigmenta, pentrita

kulupu

SUBSTANTIVO komunumo, kunularo, grupo, nacio, socio, tribo

kute

SUBSTANTIVO orelo

VERBO aŭdi, aŭskulti; atenti, obei

la

PARTIKULO (inter la kunteksta frazparto kaj la ĉeffrazo)

lape

ADJEKTIVO dormanta, ripozanta

laso

ADJEKTIVO blua, verda

lawa

SUBSTANTIVO kapo, menso

VERBO gvidi, direkti, estri, konduki, posedi, plani, reguligi, regi

len

SUBSTANTIVO ŝtofo, vestaĵo, teksaĵo; kovraĵo, tavolo de privateco

lete

ADJEKTIVO malvarma; nekuirita, kruda

li

PARTIKULO (inter subjekto krom sola *mi* aŭ sola *sina* kaj ties verbo; ankaŭ por enkonduki novan verbon de la sama subjekto)

lili

ADJEKTIVO malgranda, malalta; malmulta; iomete; juna

linja

SUBSTANTIVO io longa kaj fleksebla; kordo, haro, ŝnuro, fadeno

lipu

SUBSTANTIVO plata objekto; libro, dokumento, karto, papero, registro, retejo

loje

ADJEKTIVO ruĝa, ruĝeca

lon

PREPOZICIO estanta en iu loko, estanta ĉe, reala, vera, ekzistanta

luka

SUBSTANTIVO brako, mano, tuŝorgano

NOMBRO kvin

*lukin aŭ oko*³¹

SUBSTANTIVO okulo

VERBO rigardi, vidi, ekzameni, observi, legi, spekti

ANTAŬVERBO provi³³

lupa

SUBSTANTIVO pordo, truo, korpa aperturo, fenestro

ma

SUBSTANTIVO tero, terpeco; eksterdoma subĉiela loko, mondo; lando, ŝtato, teritorio; tero (substanco)

mama

SUBSTANTIVO patro, patrino, gepatroj, praulo; kreinto, iniciatinto, fondinto; prizorganto, bontenanto

mani

SUBSTANTIVO mono, riĉaĵoj, ŝparaĵo, kontanta mono; bruto, granda malsovaĝa besto

meli

SUBSTANTIVO virino, ino; edzino

mi

SUBSTANTIVO mi, ni

mije

SUBSTANTIVO viro, virseksulo; edzo

moku

VERBO manĝi, trinki, konsumi, gluti

moli

ADJEKTIVO mortinta, mortanta

³³Noto de la tradukinto: Ankaŭ *alasa* estas uzata ĉi-sence. Ĉe la enketoj de *Toki Pona Dictionary*, *lukin* kaj *alasa* estis same ofte uzataj por esprimi “provi”. Vidu ankaŭ la piednoton sur paĝo 54.

monsi

SUBSTANTIVO dorso, malantaŭo

mu

PARTIKULO (bleko, aŭ alia besta sono aŭ komunikaĵo)

mun

SUBSTANTIVO luno, nokta ĉiela objekto, stelo

musi

ADJEKTIVO arta, amuza, frivola, ludeca, rilata al amuziĝo

mute

ADJEKTIVO multaj, multe, pluraj, tre

SUBSTANTIVO kvanto

NOMBRO³⁴ 20

nanpa

PARTIKULO -a (kiel en “unua”, “dua”, ktp; indikas pozicion en vicordo)

SUBSTANTIVO ciferoj, nombroj

nasa

ADJEKTIVO nekutima, stranga; bufona, malserioza, stulteta; ebria

nasin

SUBSTANTIVO maniero, kutimo, doktrino, metodo, vojo, irejo

nena

SUBSTANTIVO elstara malebenaĵo, elstarajo, tubero, butono, monteto, monto, nazo

ni

ADJEKTIVO (ĉi) tiu, (ĉi) tio

³⁴Noto de la tradukinto: La signifo de *mute* kiel nombro mankas en la originala angla versio de la vortaro, kvankam ĝi ja aperas en leciono 12. (Vidu ĉe paĝo 52.) Ĉi tie ĝi estas aldonita por kompleteco.

nimi

SUBSTANTIVO nomo, vorto

noka

SUBSTANTIVO piedo, kruro, moviĝa organo; malsupro, malsupra parto

o

PARTIKULO he! (vokativo aŭ imperativo)

olin

VERBO ami, simpatii kun, respekti, montri sian korinklinon al

ona

SUBSTANTIVO li, ŝi, (ri,) ĝi, ili

open

VERBO komenci; malfermi; ŝalti

pakala

ADJEKTIVO fuŝita, rompita, damaĝita, difektita

pali

VERBO fari, agi por atingi aŭ plenumi ion, prilabori; konstrui, fari, prepari

palisa

SUBSTANTIVO io longa kaj rigida; branĉo, stango, bastono

pan

SUBSTANTIVO greno, cerealo; aveno, hordeo, maizo, rizo, tritiko; pano, pastaĵo

pana

VERBO doni, sendi, eligi, ellasi, provizi, meti

pi

PARTIKULO de

pilin

SUBSTANTIVO koro (fizika aŭ emocia)

ADJEKTIVO sentanta (emocion, rektan sperton)

pimeja

ADJEKTIVO nigra, malhela, malluma

pini

ADJEKTIVO antaŭa, finfarita, finita, finiĝinta, pasinta

pipi

SUBSTANTIVO insekto, formiko, araneo, eta senvertebrulo

poka

SUBSTANTIVO kokso, flanko; apud, proksime de, proksimaĵo

poki

SUBSTANTIVO ujo, sako, bovlo, skatolo, taso, ŝranko, tirkesto

pona

ADJEKTIVO bona, pozitiva, utila; amika, paca; simpla

pu

ADJEKTIVO interaganta kun la oficiala libro de Tokipono

sama

ADJEKTIVO sama, simila; unu la alia; gefrata, kamarada,
kunula ³⁵

PREPOZICIO kiel, simile al

seli

SUBSTANTIVO fajro; varmiga elemento de kuirilo, kemia reago,
fonto de varmo

selo

SUBSTANTIVO ekstera formo, ekstera tavolo; ŝelo (de arbo,
frukto, molusko), karapaco, haŭto; limo

³⁵Noto de la tradukinto: *jan sama* (laŭvorte “simila persono”) estas ofta esprimo por “frato, fratino, kamarado, egalulo, kunulo”. Tial la difino enhavas la tradukojn “gefrata, kamarada, kunula”.

La gefratoj de birdo estus *waso sama*, kaj se vi havus grupon da kamaradoj, eblus nomi ilin *kulupu sama mi*. Notu, ke por esprimi “fratina domo” (t.e. “domo de fratino”) oni ne uzus *tomo sama* sed *tomo pi jan sama*.

seme

PARTIKULO kio? kiu?

sewi

SUBSTANTIVO spaco super io, plej alta parto de io, io pli alta

ADJEKTIVO miriga, dia, sankta, supernatura

sijelo

SUBSTANTIVO korpo (de homo aŭ besto), fizika stato, torso

sike

SUBSTANTIVO io ronda aŭ cirkla; pilko, cirklo, ciklo, globo, sfero, rado

ADJEKTIVO de unu jaro

sin aŭ *namako*³¹

ADJEKTIVO nova, freŝa; plia, aldona, kroma

sina

SUBSTANTIVO vi

sinpin

SUBSTANTIVO vizaĝo, antaŭo, muro

sitelen

SUBSTANTIVO bildo, figuro, simbolo, markaĵo, skribaĵo

sona

VERBO scii, koni, esti lerta pri, esti saĝa pri, havi informojn pri

ANTAŬVERBO scipovi

soweli

SUBSTANTIVO besto, surtera mamulo

suli

ADJEKTIVO granda, peza, longa, alta; grava; plenkreska

suno

SUBSTANTIVO suno; lumo, heleco, ardeco, brilo; lumfonto

supa

SUBSTANTIVO horizontala surfaco, io sur kio oni metas ion alian

suwi

ADJEKTIVO dolĉa, bonodora; ĉarma, senkulpa, aminda

tan

PREPOZICIO fare de, el, pro

taso

PARTIKULO sed, tamen

ADJEKTIVO nur

tawa

PREPOZICIO al, iranta al, en la direkto al; por, al; laŭ la vidpunkto de

ADJEKTIVO moviĝanta

telo

SUBSTANTIVO akvo, likvo, fluaĵo, malseka substanco; trinkaĵo

tenpo

SUBSTANTIVO tempo, daŭro, momento, okazo, fojo, periodo, situacio

toki

VERBO komuniki, diri, paroli, uzi lingvon, pensi

tomo

SUBSTANTIVO endoma spaco; konstruaĵo, hejmo, domo, ĉambro

tu

NOMBRO du

unpa

VERBO seksumi, amori

uta

SUBSTANTIVO buŝo, lipoj, buŝa kavo, makzeloj

utala

VERBO batali, defii, konkuri kontraŭ, lukti kontraŭ

walo

ADJEKTIVO blanka, blankeca; helkolora, pala

wan

ADJEKTIVO unika, unueca

NOMBRO unu

waso

SUBSTANTIVO birdo, fluganta vivaĵo, besto kun flugiloj

wawa

ADJEKTIVO forta, potenca; memfida, nedubanta; energia, intensa

weka

ADJEKTIVO neĉeestanta, fora, ignorata

wile

ANTAŬVERBO devi, bezoni, devus ...i, voli, deziri

Aldonaĵo: *nimi ku suli pi pu ala*

Noto de la tradukinto: Ĉi tiuj ne-puaj vortoj estas menciitaj de pli ol 40 % de la respondintoj en esplorenketo, kiun Sonja faris en la tokipona komunumo. Vi povas mem elekti laŭ via propra stilo kaj prefero, ĉu vi volas uzi ilin. Se vi ŝatas la minimumismon de la pua stilo, vi povas bone elturniĝi sen la ĉi-subaj vortoj. Kaj aliflanke, se iuj aŭ ĉiuj el la vortoj plaĉas al vi, vi povas uzi ilin sciante, ke plejparto de la tokiponistaro komprenos vin senprobleme.

<i>epiku</i>	mojosa, mirinda
<i>jasima</i>	reflekti, renversa
<i>kijetesantakalu</i>	lavurso, musteloidoj
<i>kin</i>	ankaŭ, cetere
<i>kipisi</i>	dividi, fendi, tranĉi, dividaĵo, tranĉo, parto
<i>kokosila</i>	krokodili (paroli alian lingvon ol Tokiponon en tokipona medio)
<i>ku</i>	interagi kun <i>Toki Pona Dictionary</i> (libro de Sonja Lang)
<i>lanpan</i>	(for)preni, (ek)kapti, ŝteli
<i>leko</i>	kvadrato, kubo, bloko, ŝtupo, briko
<i>meso</i>	averaĝa, modera, meza, mezgranda, mezkvalita, ordinara
<i>misikeke</i>	medikamento, kuracilo, kuraci, pilolo, medicina
<i>monsuta</i>	timiga, timigaĵo, monstro, timinda sovaĝbesto, demono, maltrankviliga
<i>n</i>	hm, nu
<i>namako</i>	aldona, aldonaĵo, spico, salo, ornamaĵo, bonuso, kroma, speciala
<i>oko</i>	okulo, vidkapablo
<i>soko</i>	fungo
<i>tonsi</i>	neduuma, neduumulo, genre nekonforma persono, transgenrulo, interseksulo

En 2022 ĉi tiuj estis la plej oftaj signoj en *sitelen pona* por la apudaj ne-puaj vortoj. La komunumo ankoraŭ ne tute konsentas pri la signoj de ĉiuj vortoj ĉi tie, do atentu, ke la plej akceptata signo de iu vorto povus esti malsama post iom da tempo.



epiku



jasima



kijetesantakalu



kin



kipisi



kokosila



ku



lanpan



leko



meso



misikeke



monsuta



n



*namako*³⁶



oko



soko



tonsi

³⁶La maldekstra *namako* estas uzata ekde 2016, kaj la dekstran Sonja elpensis por propra uzado kaj publikigis en 2022.

Aldonaĵo: Listo de piednotoj

p. 7 (Antaŭparolo al la esperanta eldono)

Ligiloj al kelkaj rekomendindaj ekzemploj de tiaj tokiponaĵoj estas troveblaj sur la oficiala retpaĝo de Tokipono:

<https://tokipona.org>

p. 9 (Antaŭparolo)

ku: Ĉi tiu libro servas kvazaŭ momentfoto kaj referenco pri la maniero, kiel unu grava homo uzis Tokiponon en unu grava tempopunkto. Ĉi tiu bazo venas kun la invito en leciono 19. “Jen via vico nun. Amuziĝu. Kreu, ludu, kaj estu *pona!*”

p. 13 (Kio estas Tokipono? – Limigoj)

Noto de la tradukinto: Krom la ĉi tie menciitaj tradukoj, *Toki Pona Dictionary* proponas ankaŭ *waso alasa* (“ĉasanta birdo”) por aglo, kaj *waso moku* (“manĝaĵa birdo”) kaj *waso pi pana sike* (“glob-dona (ov-dona) birdo”) por koko.

p. 19 (Leciono 2: Vortoj kaj frazoj)

ku: La libro instruas vortojn per vortospecoj kaj ekzemplaj tradukoj, kiuj estas facile rekoneblaj por lernantoj, kiuj parolas Esperanton, ekz. substantivoj, adjektivoj, verboj. Pli profunda analizo de Tokipono malkovras, ke modelo kun enhavovortoj kaj partikuloj (inter aliaj) povus esti pli taŭga aŭ ekzakta. Por unu tia ekzemplo (anglalingva), serĉu “Toki Pona Analysis: Parts of Speech” de u/pisceyo (kala kala) en Reddit.

p. 25 (Leciono 4: Vi kaj mi)

ku: Ĉi tie la vorto *mi* estas prezentita kun la signifo “mi, ni”. Mi ŝatus substreki, ke singulareco ne estas la normo en Tokipono.

ku: Ĉi tie la libro jam instruis la vortojn *meli* kaj *mije*. La tokipona komunumo aldone kreis trian vorton, *tonsi*, kaj mi subtenas ĝin. Vidu ĝian difinon en la aldonajo (*nimi ku sulipi pu ala*) sur paĝo 148.

p. 28 (Leciono 5: Verboj)

ku: La vorto *kute* ja povas signifi obei, sed ankaŭ aliaj perceptaj verboj kiel *lukin* povas esti uzataj por obei, ekzemple se oni komunikis la ordonojn per vidaj rimedoj (ekz. per skribaĵo aŭ mansignoj).

Noto de la tradukinto: Gramatike spertaj legantoj eble rimarkis, ke en ĉi tiu libro la vorto “verbo” ofte referas specife al transitivaj verboj. (En Tokipono tio estas vorto, kies signifo ne ŝanĝiĝas, se oni metas *e* post ĝi.) Vidu ankaŭ mian noton pri netransitivaj verboj en la sekva leciono, sur paĝo 33.

p. 32 (Leciono 6: Pli da adjektivoj)

ku: Pli precize, la vorto *pu* priskribas rilaton kaj interagon inter persono (*jan pu*) kaj la libro (*lipu pu*). En malformala uzado, iuj uzas la vorton *pu* kiel nomon de la libro mem aŭ por la variaĵo de Tokipono, kiun ĝi prezentas.

p. 33 (Leciono 6: Pli da adjektivoj)

Noto de la tradukinto: Tokipona gramatiko ne distingas inter adjektivoj, adverboj kaj netransitivaj verboj. Tial en la vortlistoj en ĉi tiu libro la vortoj, kiujn oni kutime tradukas per netransitivaj verboj, estas markitaj kiel adjektivoj kaj havas tradukojn, kiuj finiĝas je “-anta”. Ekzemple, *mi lape* (“mi dormas”) estas analizebla kiel “mi estas dormanta”.

p. 37 (Leciono 7: Demandoj kaj respondoj)

ku: Kelkaj homoj faras ĉu-demandojn per nur intonacio, sen aldoni *anu seme* aŭ uzi la *ala*-metodon. Kvankam tio povas okazi spontanee en kelkaj situacioj, mi ne rekomendus tion kiel la ĉefan manieron por fari ĉu-demandojn, aparte se oni skribas.

Aldone al la metodo ripeti la verbon por diri “jes”, oni ankaŭ tre ofte aŭdas “lon” kun la signifo “jes, tio estas vera”.

p. 39 (Leciono 8: Prepozicioj)

ku: En fruaj jaroj de tokipona historio, oni uzis *kepeken* kaj kiel prepozicion (sen *e*) kaj kiel transitivan verbon (kun *e*). Poste iuj provis fari tiel, ke *kepeken* estu uzata nur kiel prepozicio, t.e. sen *e*. Nuntempe iuj homoj uzas *kepeken e*, kvankam la plejmulto uzas *kepeken* nur kiel prepozicion. Povas esti, ke ambaŭ metodoj havas siajn avantaĝojn.

Prepozicia stilo:

o kepeken ala ilo ike. aŭ *o kepeken ilo ike ala.*

Transitivverba stilo:

o kepeken ala e ilo ike. aŭ o kepeken e ilo ike ala.

Multaj parolantoj uzas prepoziciojn ankaŭ kiel substantivojn.

Ekzemple:

mi sona ala e tan. Mi ne scias la kialon.

mi toki e lon. Mi diras la veron.

p. 40 (Leciono 8: Prepozicioj)

ku: Mi mem uzas la prepozicion *lon* en tre larĝa signifo. Oni povus esprimi la ekzemplon *mi toki lon toki pona* ankaŭ per *mi toki kepeken toki pona*, kaj multaj tokiponaj parolantoj preferas tion. Mi mem uzas *lon* ankaŭ, kiam mi parolas “pri” io: *mi toki lon kili*. Mi parolas pri karotoj.

p. 43 (Leciono 9: Propraj nomoj)

ku: Por “ĉina virino” multaj homoj opinias, ke estas pli klare diri *meli pi ma Sonko* aŭ *meli tan ma Sonko* aŭ *meli pi kulupu Sonko*. Tio evitas, ke oni miskomprenus ĝin kiel “virino, kiu nomiĝas Sonko”, ĉar la ĉefa interpreto de “[substantivo] [Nomo]” estas “[substantivo], kiu nomiĝas [Nomo]”.

p. 49 (Leciono 11: *pi*)

ku: Kvankam la partikulo *pi* ĉi tie havas la tradukon “de”, estus pli precize dirite, ke *pi* aligrupigas modifilojn. Kiel la ekzemploj montras, ĝi ne kondukas ekzakte same kiel la esperanta vorto “de”. Eble povus esti utile kompari la

konduton de *pi* al kunmetado en Esperanto. Ekzemple, komparu:

pali jan wan unu persona projekto (unu projekto de iu homo)

pali pi jan wan unupersona projekto (projekto farita de unu homo)

waso kule tu du buntaj birdoj

waso pi kule tu dukolora birdo

Cetere, ekzistas tute alia uzmaniero de *pi*, laŭ la strukturo *A pi B en C*. Ĝi estas tre malnova uzmaniero de *pi*, kiun kelkaj daŭre uzas. Tamen, multaj parolantoj malŝatas uzi ĝin. Ekzemple, *linja pi ma en sewi* estas unu maniero por diri “horizonto”, kaj *musi pi kiwen walo en kiwen pimeja* estas unu maniero por diri “ŝako”.

p. 51 (Leciono 11: *pi*)

ku: Ĉi tiu proverba tokipona klerulo atentu ankaŭ la uzadon en la tokipona komunumo.

p. 54 (Leciono 13: Antaŭverboj)

ku: Aliaj ekzemploj de antaŭverboj uzataj en la komunumo estas *alasa*, *open*, *pini* kaj *tawa*:

o alasa lukin e lipu. Provu legi la dokumenton.

mi open seli e pan. Mi komencis kuiri rizon.

sina pini moku e kili. Vi finis manĝi la kumkvaton.

mi tawa moku e kala. Mi iras manĝi marfruktojn.

p. 57 (Leciono 14: Koloroj kaj *la*)

ku: Laŭ mia opinio, ne gravas, ĉu oni uzas komon antaŭ *la*, post *la* aŭ tute ne uzas ĝin. Tio estas nur persona elekto pri stilo.

p. 60 (Leciono 15: Lokvortoj)

ku: La pua libro enkondukas iom strangan uzmanieron de *noka*, kiu ne kongruas kun ĝia tradicia uzmaniero. Oni multe pli ofte uzas *noka* kiel “kruro, piedo” kaj *anpa* kiel “suba loko, malsupra parto”.

p. 62 (Leciono 16: Partikuloj kaj perspektivoj)

Pri “gefrata”, vidu la piednoton sur paĝo 144.

ku: En pua stilo, la partikulo *li* povas enkonduki novan verbon por triapersona subjekto, sed se la subjekto estas *mi* aŭ *sina*, oni komencas novan frazon. Tio estas restaĵo de tio, ke *li* estis origine markilo por tria persono. Multaj parolantoj plilarĝigis la uzmanieron de *li* tiel, ke ĝi povas enkonduki novan verbon, eĉ se la subjekto estas *mi* aŭ *sina*.

pua stilo:

jan li toki li moku. La persono parolas kaj manĝas.

mi toki. mi moku. Mi parolas kaj manĝas.

Pli larĝa uzado de *li*:

jan li toki li moku. La persono parolas kaj manĝas.

mi toki li moku. Mi parolas kaj manĝas.

p. 64 (Leciono 17: Ĉasa aventuro)

ku: Eblas ankaŭ: *mi wile e ni: jan Melani li kama lon tomo mi.*

p. 68 (Leciono 19: Ek al la esplorado)

ku: Jen senkonteste la plej grava mesaĝo en *lipu pu.*

p. 82 (Tokiponaj proverboj)

ku: Kompreneble ne ĉiuj viroj spertas alisekseman allogon ĉi-maniere.

p. 104 (Mansigna Tokipono)

ku: Mansigna Tokipono (*toki pona luka*) estas proponita kiel amuzaĵo por batali kun loĵbanistoj. Ekde tiam ekestis nova kaj tre *pona* projekto, Lukapono (*luka pona*), kiun *jan Olipija* inventis kiel naturalisman signolingvon uzeblan apud Tokipono. Mi rekomendas lerni Lukaponon.


p. 116 (Hieroglifoj)

Noto de la aŭtorino: Kvarpiede estas pli ĉarme:



p. 117 (Hieroglifoj)

Noto de la tradukinto: Pli-malpli iu ajn sufiĉe ĥaosa skribaĉo povas esti uzata por skribi *jaki*. Jen kelkaj skribitaj de mi:



p. 120 (Hieroglifoj)

ku: Ekzistas ankaŭ alternativa sekulara formo de la signo de *sewi*:



Ĝi kongruas kun la aliaj lokvortoj, kiel *anpa*.

p. 123 (Hieroglifoj)

ku: La komunumo kreis *sitelen-pona*-signojn por multaj ne-puaj vortoj. Ekzemploj de du elstaraj tiparaj projektoj estas *linja sike* de *lipamanka* kaj *linja suwi* de *jan Ana*.

(Kelkaj el la plej oftaj ne-puaj signoj estas sur paĝo 149)

p. 124 (Loknomoj)

ku: Ĉi tiuj tokiponigoj estis proponitaj kiel sugestoj, kaj ili daŭre estas utilaj, se oni ne trovas pli uzindan alternativon. Se la parolantoj en la tokipona komunumo, kaj aparte tiuj kun rilato al la koncerna loko aŭ lingvo, konsentas inter si pri preferata tokipona nomo, bonvolu uzi tiun formon. En Tokipono oni preferas uzi endonimojn. Oni ankaŭ preferas reuzi la saman vorton por la lando, la lingvo kaj la gento. Rigardu ĉe *nimi.tokipona.org*

p. 128 (Loknomoj)

ku: Ĉu la ekzemplo *ma Sawusi* estas eraro, aŭ indiko, ke tokipona fonotakso estas malpli strikta, kiam oni tokiponigas alilingvajn vortojn?

p. 136 (Utilaj frazoj)

Noto de la tradukinto: *sina pona* estas ankaŭ ofte uzata por diri “dankon”, nuntempe (en 2022) iom pli ofte ol nura *pona*.

p. 137 (Oficiala tokipona vortaro)

ku: Por malpliigi la vortostokon por lernantoj, la originala angla versio de ĉi tiu libro prezentis kelkajn vortojn kiel unuiĝintajn sinonimojn: *a* kaj *kin*, *sin* kaj *namako*, *lukin* kaj *oko*. En efektiva uzado en la tokipona komunumo, kaj antaŭ kaj post la unua eldono de la libro, oni uzas ĉi tiujn vortojn kun malsamaj signifoj. Vidu iliajn difinojn en la aldonaĵo (*nimi ku sulipi pu ala*) sur paĝo 148.

Noto de la tradukinto: La originala angla eldono havas ĉe *akesi* la signifon “neĉarma besto”, sed laŭ la notoj de Sonja Lang en *Toki Pona Dictionary* tiu signifo estas eksdata.

p. 141 (Oficiala tokipona vortaro)

Noto de la tradukinto: Ankaŭ *alasa* estas uzata ĉi-sence. Ĉe la enketoj de *Toki Pona Dictionary*, *lukin* kaj *alasa* estis same ofte uzataj por esprimi “provi”. Vidu ankaŭ la piednoton sur paĝo 54.

p. 142 (Oficiala tokipona vortaro)

Noto de la tradukinto: La signifo de *mute* kiel nombro mankas en la originala angla versio de la vortaro, kvankam ĝi ja aperas

en leciono 12. (Vidu ĉe paĝo 52.) Ĉi tie ĝi estas aldonita por kompleteco.

p. 144 (Oficiala tokipona vortaro)

Noto de la tradukinto: *jan sama* (laŭvorte “simila persono”) estas ofta esprimo por “frato, fratino, kamarado, egalulo, kunulo”. Tial la difino enhavas la tradukojn “gefrata, kamarada, kunula”.

La gefratoj de birdo estus *waso sama*, kaj se vi havus grupon da kamaradoj, eblus nomi ilin *kulupu sama mi*. Notu, ke por esprimi “fratina domo” (t.e. “domo de fratino”) oni ne uzus *tomo sama* sed *tomo pi jan sama*.

p. 149 (Aldonaĵo: *nimi ku suli pi pu ala*)

La maldekstra *namako* estas uzata ekde 2016, kaj la dekstran Sonja elpensis por propra uzado kaj publikigis en 2022.

Detalaj agnoskoj (en Esperanto)

La paĝnumeroj en la agnoskoj referencas al la paĝnumeroj de la fizika libro, kiuj estas malsupre sur la paĝoj.

Jen la uzitaj permesiloj de Krea Komunaĵo kaj la korespondaj mallongigoj. Rigardu la retpaĝojn por informoj pri tio, kion vi rajtas fari por la permesilo, kaj kiuj kondiĉoj ekzistas.

- CC BY 4.0 – Attribution 4.0 International
<https://creativecommons.org/licenses/by/4.0/deed.eo>
- CC0 1.0 – CC0 1.0 Universal Public Domain Dedication
<https://creativecommons.org/publicdomain/zero/1.0/deed.eo>

Teksto sur paĝoj 3, 116-123, 137-147 (ekskluzive de piednotoj) estas verkitaj de Sonja Lang (2014), kaj tradukitaj de Spencer van der Meulen (2022).

Permesilo: CC0 1.0 (publika havaĵo)

La teksto sur paĝoj 7-8 estas verkita de Spencer van der Meulen (2022).

Permesilo: CC0 1.0 (publika havaĵo)

La tokipona teksto sur paĝo 95 estas verkita de Joop Kieft (verkojaro nekonata). La enkonduko kaj esperanta traduko estas faritaj de Spencer van der Meulen (2022).

Permesilo: CC0 1.0 (publika havaĵo)

La tokipona teksto sur paĝo 96 estas verkita de Eŭgeno; originala versio el 2009, ĉi tiu versio el 2022. La enkonduko sur paĝo 96 kaj esperanta traduko sur paĝo 97 estas faritaj de Spencer van der Meulen (2022).

Permesilo: CC BY 4.0

La poemo *Ho, mia kor'* sur paĝo 98 estas verkita de L. L. Zamenhof (1887). La tokipona versio kaj akompanaj klarigoj estas verkitaj de Spencer van der Meulen (2022).

Permesilo: CC0 1.0 (publika havaĵo)

La teksto sur paĝo 148 estas verkita de Julius Strake kaj Spencer van der Meulen, esperanta traduko de Spencer van der Meulen. La teksto sur paĝo 149 estas verkita de Spencer van der Meulen.

Permesilo: CC0 1.0 (publika havaĵo)

La ilustraĵo sur paĝo 1 estas farita de Sonja Lang (2014) kaj (re)vektorita de Spencer van der Meulen (2022).

Permesilo: CC0 1.0 (publika havaĵo)

La *sitelen-pona*-ilustraĵoj sur paĝoj 116-123 (ekskluzive de piednotoj) estas faritaj de Sonja Lang (2014).

Permesilo: CC0 1.0 (publika havaĵo)

La piednotoj markitaj per “ku” estas verkitaj de Sonja Lang (2021), kaj tradukitaj kaj adaptitaj de Spencer van der Meulen (2022), laŭ la sama stilo kiel la piednotoj de Julius Strake en *Toki Pona: Die Sprache des Guten* (2021).

La piednoto sur paĝo 116 markita per “Noto de la aŭtorino” estas verkita de Sonja Lang (2022).

La piednoto sur paĝo 142 estas verkita de Julius Strake (2021) kaj tradukita de Spencer van der Meulen (2022).

Aliaj piednotoj estas verkitaj de Spencer van der Meulen (2022).

Permesilo: CC BY 4.0

(Piednotoj sur CC0-aj paĝoj (7, 116-123, 137-149) estas ankaŭ uzeblaj per CC0 1.0.)

La *sitelen-pona*-ilustraĵoj sur paĝo 149 kaj en la piednotoj de paĝoj 116-117 kaj 120 estas faritaj de Spencer van der Meulen (2022).

Permesilo: CC0 1.0 (publika havaĵo)

Detailed credits (in English)

The page numbers in these credits refer to the page numbers of the physical book, which are located at the bottom of each page.

These are the Creative Commons licenses that were used and their abbreviations. Check the webpages for information about what each license allows you to do and what terms apply.

- CC BY 4.0 – Attribution 4.0 International
<https://creativecommons.org/licenses/by/4.0/>
- CC0 1.0 – CC0 1.0 Universal Public Domain Dedication
<https://creativecommons.org/publicdomain/zero/1.0/>

Texts on pages 3, 116-123, 137-147 (not including footnotes) are written by Sonja Lang (2014), and translated by Spencer van der Meulen (2022).

License: CC0 1.0 (public domain)

The tekst on pages 7-8 is written by Spencer van der Meulen (2022).

License: CC0 1.0 (public domain)

The Toki Pona text on page 95 is written by Joop Kiefte (year unknown). The introduction and Esperanto translation are written by Spencer van der Meulen (2022).

License: CC0 1.0 (public domain)

The Toki Pona text on page 96 is written by Eŭgeno; original version from 2009, this version from 2022. The introduction on page 96 and the Esperanto translation on page 97 are written by Spencer van der Meulen (2022).

License: CC BY 4.0

The poem *Ho, mia kor'* on page 98 is written by L. L. Zamenhof (1887). The Toki Pona version and accompanying explanations are written by Spencer van der Meulen (2022).

License: CC0 1.0 (public domain)

The tekst on page 148 is written by Julius Strake and Spencer van der Meulen, Esperanto translation by Spencer van der Meulen. The text on page 149 is written by Spencer van der Meulen.

License: CC0 1.0 (public domain)

The illustration on page 1 is made by Sonja Lang (2014) and (re)vectorized by Spencer van der Meulen (2022).

License: CC0 1.0 (public domain)

The *sitelen pona* illustrations on pages 116-123 (not including footnotes) are made by Sonja Lang (2014).

License: CC0 1.0 (public domain)

The footnotes marked with “ku” are written by Sonja Lang (2021), and translated and adapted by Spencer van der Meulen (2022), following the style of the footnotes from Julius Strake in *Toki Pona: Die Sprache des Guten* (2021).

The footnote on page 116 marked with “Noto de la aŭtorino” is written by Sonja Lang (2022).

The footnote on page 142 is written by Julius Strake (2021) and translated by Spencer van der Meulen (2022).

Other footnotes are written by Spencer van der Meulen (2022).

License: CC BY 4.0

(Footnotes on CC0 pages (7, 116-123, 137-149) are additionally available under CC0 1.0.)

The *sitelen pona* illustrations on page 149 and in the footnotes on pages 116-117 and 120 are made by Spencer van der Meulen (2022).

License: CC0 1.0 (public domain)